

RAPORTO PRI AGADO EN 2019 prezentita dum la jarkunveno la 23-an de februaro 2020

En 2019 Bjelovara Esperantista Societo (BES) daŭrigis sian plurjaran sukcesan laboron. Fine de 2018 BES havis 40 membrojn, kaj fine de 2019 entute 41 membrojn, ĉar en 2019 unu membro mortis (Martin Fejer) kaj aliĝis du novaj membroj.

Dum la jaro okazis 20 kunsidoj de la Estraro kaj Kontrolkomitato: la 10-an kaj 28-an de januaro, la 14-an kaj 21-an de februaro, la 7-an kaj 19-an de marto, la 4-an kaj 18-an de aprilo, la 2-an, 16-an, 24-an kaj 30-an de majo, la 13-an de junio, la 4-an, 11-an kaj 18-an de julio, la 23-an de aŭgusto, la 4-an, 11-an kaj 16-an de septembro kaj la 12-an de decembro.

Krome, okazis du jarkunvenoj. Regula jarkunveno okazis la 24-an de februaro 2019 kaj la elekta jarkunveno la 1-an de septembro 2019.

Dum la elekta jarkunveno estis elektita nova gvidantaro por sekva kvarjara mandato, en jena konsisto:

Estraro: Franjo Forjan kiel prezidanto, Grozdana Grubišić-Popović kiel sekretario, Nenad Margetić kiel kasisto kaj kiel membroj Damir Matašin, Berislav Rubčić, Mirjana Saks kaj Đurđa Vučetić (anstataŭ Martin Fejer pro lia malbona sanstato).

Kontrolkomitato: Zdenka Polašek kiel prezidantino, kaj kel membroj Željko Saks kaj Jasna Piščević (anstataŭ la emeritiĝinta Vinko Grgurev, kiu translokiĝis al Vodice).

Dum la elekta jarkunveno estis ŝanĝita ankaŭ la societa statuto.

Dum la regula jarkunveno la 24-an de februaro estis akceptita laborplano por 2019, en kiu kiel la ĉefa aktiveco estis antaŭvidita organizado de la 7-a renkontiĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo* kun la ĉefa temo *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*. Diversaj aktivaĵoj pri la festado de ĉi tiu jubileo kaj plidetalingo de la programo de la aranĝo estis la kerno de la laboro dum ĉiuj kunsidoj de la Estraro kaj Kontrolkomitato. Kvankam dum la preparoj aperadis grandaj problemoj, oni povas konkludi, ke la 7-a renkontiĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo* tamen estis tre sukcesa kaj sufiĉe bone vizitita kaj menciita en la informaj medioj.

La renkontiĝo okazis inter la 20-a kaj 23-a de septembro, sed parto de la programoj estis malfermita pli frue aŭ daŭris pli longe post la oficialaj okazo-datoj. Samkiel kutime dum antaŭaj jaroj, ankaŭ en 2019 la renkontiĝo estis parto de la programo okaze de Tago de la urbo Bjelovar kaj Tago de bjelovaraj defendantoj, aŭspiciita de Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora.

La aranĝo estis anoncita per ekspozicieto en la Popola biblioteko *Petar Preradović*, starigita la 28-an de aŭgusto kaj daŭranta ĝis la 25-a de septembro.

En la kela glerio de la Urba muzeo Bjelovar la 4-an de septembro estis malfermita la ekspozicio *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*, en kiu sur 13 paneloj estis prezentita la riĉa historio de Esperanto en nia urbo. Aŭtoro de la ekspozicio estis Josip Pleadin, kiu uzis la arkivon de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, kaj diversaj objektoj kaj fotoj, kiujn pruntis la membroj de DEB kaj eksaj bjelovaraj esperantistoj, estis ekspoziciitaj en kelkaj vitrinoj. En la malfermo de la ekspozicio parolis la direktoro de la Muzeo Milan Pavlović kaj la aŭtoro de la ekspozicio Josip Pleadin, oficiale ĝin malfermis anstataŭantino de la departementestro Bojana

Hribljan, kaj ĝi estis vizitebla ĝis la 23-a de septembro. La ekspozicio dufoje estis filmita por loka kaj nacia televido.

La aranĝo oficiale komenciĝis per amikumado dum la Interkona vespero kaj malfermo de la pentrafekspozicio *Amo per koloroj eldirita* de esperantistino kaj pentristino Luce Cetinić el Split, kiu partoprenis la malfermon. Interkonsentadon pri la ekspozicio kaj transportadon de la pentraĵoj el Split faris Grozdana Grubišić-Popović, kaj dum la malfermo parolis sinjorino Snježana Mišir, estrino de la departementa oficejo pri sano, socia protekto kaj emeritoj kaj Martin Schäffer, direktoro de Universala Esperanto-Asocio el Roterdamo. La programon gvidis Ljiljana Rubčić en la kroata lingvo kaj Grozdana Grubišić-Popović en Esperanto. La ĉeestintojn salutis la prezidanto de DEB Franjo Forjan kaj la posedanto de la Kaferjo kaj dolĉaĵejo *Zagorje* Božidar Zagorac, dum pri la aŭtorino parolis Josip Pleadin.

Sabaton, la 21-an de septembro, en la Kulturdomo okazis Festa kunveno, kiun partoprenis kaj al DEB gratulis la urbestro de Bjelovar, sinjoro Dario Hrebak.

En la kultura programo de la Festa kunveno prezentiĝis la muzikistoj kaj kantistoj de la kultur-arta societo *Golub*, sub gvidado de sia direktisto Goran Kruno Kukolj. Unue ili prezentis la kroatan kaj Esperantan himnojn, kiujn kantis profesoro de Muziklernejo *Vatroslav Lisinski* Vedran Milić, kaj poste estis prezentitaj kelkaj muzikaĵoj, el kiuj certe la plej grava estis prezento de la marŝo *Esperantista Stevo*, kiun en 1952 komponis la konata bjelovara muzikisto kaj esperantisto Ivan Barešić, dediĉinte ĝin al la bjelovara esperantisto Stjepan Maltar, kies familianoj troviĝis en la publiko.

Al la programo kontribuis ankaŭ lernantoj de Muziklernejo *Vatroslav Lisinski* Lorena Radičević kaj Luka Baranašić per violonoj, kiujn trejnigis profesorino Alida Sokolović, kaj koruso de la Elementa lernejo *Mato Lovrak* el Veliki Grđevac, trejnita de instruistinoj Marina Balen, Marica Čičak kaj Christine Smoljanec.

Dum la Festa kunveno al Urbo Bjelovar estis atribuita dankdiplomo, kiun transprenis la urbestro Hrebak, kaj identa diplomo al Departemento Bjelovar-Bilogora, kiun poste oni portis en la departementan sidejon. Krome, estis atribuitaj diplomoj al ses meritaj bjelovaraj esperantistoj: Fran Kolar-Krom, Dragutin Štokić kaj Vilim Polašek postmorte, kaj al tri vivantaj esperantistoj: Ivan Petreković, Zdenka Polašek kaj Franjo Forjan.

Komputilan projekcion pri la historio de Esperanto en Bjelovar pretigis komentis Josip Pleadin. Bedaŭrinde, pro monmanko ne estis realigita dokumenta filmo pri la sama temo.

La programon gvidis Ljerka Stilinović en Esperanto kaj Grozdana Grubišić-Popović en la kroata lingvo.

Post la Festa kunveno estis farita komuna foto de la partoprenantoj ĉe la pavilono en la urba parko, kaj poste oni vizitis la Arbon de internacia amikeco en la parko ĉe la Placo de Stjepan Radić, plantitan dum la 20-a Alp-Adria Esperanto-konferenco.

Dum la posttagmezaj horoj estis inaŭgurita memortabulo al la plej merita bjelovara esperantisto Vilim Polašek sur la fronta muro de la domo en la Strato Tomo Bakač 2, kie li vivis kaj laboris. Dum la inaŭguro de la memortabulo pri la agado kaj signifo de Vilim Polašek parolis Josip Pleadin kaj la tabulon malkovris lia nepino Tea Macan kaj la direktoro de UEA Martin Schäffer. La memortabulon gravuris la firmao *Mirta* el Klokočevac, kaj financis ĝin Departemento Bjelovar-Bilogora.

La posttagmeza programo estis organizita en la Hotelo *Central*, kie krom la solena tagmanĝo okazis la 7-a deklamkonkurso kun rekorda nombro da deklamantoj, eĉ 25! Same kiel dum la antaŭaj jaroj oni deklamis en tri kategorioj, sed ĉi-jare partoprenis ankaŭ kelkaj personoj ekster la konkurenco. En la kategorio de elementlernejanoj la plej bona deklamantino estis Lara Čurčija el Bulinac (lernantino de Elementa lernejo *Ivan vitez Trnski*, Nova Rača), inter la mezlernejanoj kaj studentoj venkis Lara Tišljar el la Gimnazio *Ivan Kranjčev* el Đurđevac, kaj la plej bona plenkreska deklamantino estis Marija Jerković el Zagrebo. Ĉiuj partoprenintoj ricevis

specialajn diplomojn, kaj la plej bonaj estis premiitaj per libroj kaj medaloj, dum Magdalena Mesarov el la Gimanzio *Ivan Kranjčev* el Đurđevac, ricevis specialan pokalon kiel la plej bona deklamantino en ĉiuj kategorioj. La programon gvidis Zdravko Seleš, kaj la konkursa ĵurio konsistis el Spomenka Štimec (Zagrebo), Blazio Wacha (Budapeŝto) kaj Franjo Forjan (Bjelovar).

Laŭ la decido de la Estraro de DEB, ĉi tiu estis la lasta deklamkonkurso kiu okazis en nia urbo, ĉar oni opiniis, ke post sep jaroj da sinsekva okazado en Bjelovar, oni devas ŝanĝi la lokon, por eviti monotonecon. Pri ĉi tiu decido la partoprenantoj estis informitaj post la fino de la deklamkonkurso

La partoprenantojn amuzis la bjelovara muzikisto Marijan Žiher.

Dimanĉon, la 22-an de septembro, por la partoprenantoj estis organizita tutaga ekskurso al Đurđevac, dum kiu estis vizititaj la fortikaĵo Malnova urbo kaj la ekspozicio de la hispana pentristo Salvador Dalí. Poste sekvis la oficiala inaŭguro de la novkonstruita domo de Dokumenta Esperanto-Centro, en kiu estos lokita la nacia Esperanto-arkivo. La konstruado okazis per mondoncoj de multaj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj, honore al kiuj sur la domo estis starigita memortabulo, kiun kune malkovris Josip Pleadin kaj Martin Schäffer. Dum la inaŭguro parolis Josip Pleadin, la iniciatinto de la konstruado de la domo kaj la prezidanto de DEC Zdravko Seleš. Por la ĉeestintoj estis organizita pikniko kun tagmanĝo kaj ilin amuzis la muzikgrupo *Cold shower* el Velika Gorica, kiun por tiu okazo al Đurđevac venigis la Esperanto-societo *Mondo paca* el Velika Gorica. Oni vojaĝis per organizita buso kaj per propraj aŭtomobiloj, kaj la inaŭguron ĉeestis ĉirkaŭ cent personoj.

Ĉi-loke menciendas ankaŭ, ke la inaŭguro de la domo okazis ĝuste en la jaro, kiam la „tradicio de Esperanto en Kroatio” akiris la statuson de nemateria kultura heredaĵo kaj ke DEB kaj DEC, kiuj jam dum jaroj kune laboras pri kolektado de arkiva materialo, estas portantoj de tiu kultura heredaĵo. Surbaze de tia kunlaboro estis realigita ankaŭ la reprezenta plenkolora eldono de monografio *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*, verkita de Josip Pleadin. La eldonisto estis DEB, kaj ĝi estis eldonita per financa subteno de Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora en eldonkvanto de 300 ekzempleroj. La promocio de la monografio okazis la 23-an de septembro en Popola biblioteko *Petar Preradović* en Bjelovar. La libroprezenton gvidis Tina Gatalica, laborantino de la biblioteko, kaj pri la verko parolis Mihaela Cik kaj la aŭtoro Josip Pleadin.

Okaze de sia granda jubileo DEB ricevis du altrangajn premiojn: la departementan premion *Plakedo Trnski* kaj la urban premion *Sigelo de Urbo Bjelovar*, ambaŭ por sia multjara kultura agado.

Kiel aldonajn programojn de la aranĝo ni devas mencii, ke en la urbo restadis grupo de ĉeĥaj esperantistoj, reprezentantoj de la Esperanto-muzeo el urbo Svitavy, por kiuj estis organizita akcepto en la Ĉeĥa komunumo. La gastoj el Ĉeĥio donacis grandan kvanton da duoblaĵoj de libroj kaj gazetoj el sia kolekto.

En la poŝtoficejo 43000 Bjelovar la 21-an de septembro estis uzita speciala poŝta stampo, kaj estis eldonita ankaŭ porokaza filatela koverto. La stampon kreis la bjelovara grafika dezajnisto Krešimir Ivanček, kaj la tutan projekton organizis Željko Saks.

Krom la jam menciitaj aŭspiciantoj Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora, estis petita aŭspicio ankaŭ de Universala Esperanto-Asocio, sed ĝi ne realiĝis. Ne realiĝis ankaŭ la petita subvencio de la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation* por la monografio, sed la projekto de la monografio tamen estis sukcese realigita.

Per siaj donacoj kaj partopreno en 2019, ĉefe por la 7-a renkontiĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo* al ni helpis: Flora ateliero *Marina*, Ĉeĥa komunumo, Muziklernejo *Vatroslav Lisinski*, Urba muzeo Bjelovar, Kafejo kaj dolĉaĵejo *Zagorje*, Popola biblioteko *Petar Preradović*, Komunumo Veliki Grđevac, Kultur-arta societo *Golub*, firmao *Rotor* el Bjelovar,

firmao *Telecron* el Zagrebo, Turisma asocio Bilogora-Bjelovar, firmao *Zvone* el Gornje Plavnice, Komunumo Nova Rača, Elementa lernejo *Mato Lovrak* el Veliki Grđevac, Paroko de sankta Tereza de Avila el Bjelovar kaj multaj aliaj.

Por la aranĝo estis pretigitaj specialaj butoninsignoj, kaj la aŭtoro de la logoo estis Krešimir Ivanček.

Krom multaj afiŝoj kaj invitiloj, estis presita speciala programlibro. La preslaborojn ĉefe plenumis Presejo Horvat kaj Čvor.

La aranĝo estis bone prezentita en inform-medioj, kiel en la presitaj samtiel en la elektronikaj, antaŭ, dum kaj post la aranĝo. En *Bjelovarski list* aperis pluraj artikoloj, el kiuj aparte longaj estis la artikoloj *Esperanto proklamita nemateria kultura heredaĵo* en la numero 532 de la 4-a de marto 2019, *Diligentaj iniciatintoj de la socia vivo en Bjelovar* en la numero 534 de la 15-a de aprilo kaj *Oni tradukadis librojn kaj eldonadis lernolibrojn* en la numero 539 de la 20-a de aprilo. Pri Esperanto en Bjelovar dufoje raportis la nacia televido HRT, estis prezentita unu radioelsendo en la loka radio, publikigita longa artikolo en la gazeto *Tempo* de Kroata Esperanto-Ligo (n-ro 134, novembro 2019) kaj detala raporto en la gazeto *Esperanto-revuo* de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo (n-ro 1340, novembro 2019). Krome, multaj artikoloj aperis en diversaj interretaj paĝoj, kiel ekzemple en *bjelovar.info*, *bjelovarac.hr*, *www.goucker.com*, *www.gradski-muzej-bjelovar.hr*, *www.esperanto.hr*, *postpress.com.hr*, *www.gimnazija-ikranjceva-djurdjevac.skole.hr*, *www.zupan.hr*, *www.knjiznica-bjelovar.hr*, *podravskiradio.net*, *www.centarkulture.com*, *www.posta.hr*, *www.zvono.eu*, *bibliografija.nsk.hr*, *bbz.hr*, *prigorski.hr* ktp.

Ankaŭ en 2019 DEB havis sian retpaĝaron. La decidon pri la plua uzado de la domajno estis akceptita dum la kunsido de la Estraro kaj Kontrolkomitato la 24-an de januaro, kaj la paĝaron redaktis Sanja Forjan Pleskina kun helpo de Josip Pleadin.

Dum la jarkunvenoj oni denove diskutis pri la alta aĝo de la membraro kaj pri la neceso plijunigi ĝin, kion oni planas kiel aktivajon, al kiu oni dediĉos pli da atento en 2020.

Dum la jaro estis solvitaj du problemoj el la interrilatoj de DEB kun aliaj organizaĵoj kaj personoj. Dum la kunsido kun la gvidantaro de la Urba muzeo la 17-an de aprilo estis solvita la problemo aperinta en 2018, kaj la kunlaboro kun ĉi tiu institucio estis daŭrigita en partnereca tono.

En 2019 unu el la najbaroj plendis pri la laboro de DEB, kiu rilatis la uzadon de la societejo, ricevita kontrakte de Urbo Bjelovar. La problemo estis solvita per kopiado de la ŝlosilo interkonsente kun Urbo Bjelovar.

La delegitoj de DEB partoprenis la jarkunvenojn de Kroata Esperanto-Ligo la 1-an de junio kaj 16-an de decembro 2019.

Kvankam oni povus diri ke la Laborplano kaj programo por 2019 estis grandparte realigita, oni devas mencii, ke ni ne organizis vojaĝon al la kongreso de italaj esperantistoj en Triesto pro altaj kostoj, nek la planitan partoprenon al la renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina, ĉar ĝi ne okazis.

Raportis:
Grozdana Grubišić-Popović
sekretario de DEB